# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 09/06/2022 Kvincentokdeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 721,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **171,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **151,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **100,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



## la esperanta retradio



**Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan**

**Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

**AMO JE UNUA VIDO** **6A JUNIO 2022**

# Du ekonomie sistemoj batalas




Milite. Ekonomie. Propagande. Mensoge

Baldaŭ la sep miliardoj da homoj de la

Ne-Okcidenta mondo decidos subteni

ŝanĝon aŭ ne for de la nuna unu miliardo de la

Okcidenta mondo kiuj regas nun



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 04a de junio estis la unua sabato Venis Roger, John, Chris kaj Ian *Roger Springer*

**El Adelajdo** La klubkunvenon de la 1-a de junio partoprenis 12 personoj. Ĝi okazis zoom-e. Unu el la pritraktataj temoj estis, ĉu ni reiru al la ĉeestaj kunvenoj.

La ĉefparolanto estis Bob Felby. Li rakontis pri siaj lernejaj jaroj dum la Dua Mondmilito kaj pri siaj spertoj kiel jam esperantisto (li lernis Esperanton en 1950).


Ni ĝojis vidi Paul Desailly, kiu nun kontraŭbatalas haŭtkanceron.

Trevor Steele pensigis la ĉeestantojn per tasko trovi la vortojn, kiujn priskribas la donitaj difinoj. Amike, *Katja Steele*



La elsendo de AE585 estis fuŝita ĉar la elsenda kompanio kredis ke ĝi estas SPAMO. Post multaj provoj elsendi mi esperis ke sukcesos la elsendo de la Novaĵletero la sekvantan matenon. Al ĉiuj elsendaj provoj mi metis identigan kodon por ke mi povu sekvi la rezultojn. ( a2, b2, ktp)
Se al vi mankas kopio, sekvu la suban ligon. Ctrl+klaku la veran ligilon)
http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #) *Roger Springer*

# Historio ripetas sin Gazeto *PUNCH* 24 de aprilo 1904




Rusa Urso, kun sabro, staris antaŭ Japanujo, Anglujo, Usono, Germanujo, Francujo, Italujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Turkujo kaj Hispanujo kaj ĉiuj minacis per pafiloj kaj bajonetoj. Malantaŭe, kiel nun, sidis la ridanta saĝa Ĉinujo. Sendis *Vera Payne*



# Jen mia reago al la artikolo de Marcel AE585

La tragedio de tiu juna laboristo raportita de Marcel estas tiom terura ke mi bedaŭras ke mi legis ĝin kaj eksciis pri ĝi. Malfacilas elriri el mia menso la bildon de la suferoj de tiu junulo. Tamen mi scias ke tia konduto de pli aĝaj laboristoj - proponi “ŝercon” por havi iom da amuzo je la kosto de nova juna dungito-ne estis malofta. Kvankam la konsekvencoj ne estis agrablaj por la juna persono , ili kutime ne kaŭzis morton. Mi memoras la rakontojn de maljunulino , samaĝa kiel mia avino. Ŝi diris ke ĉiu nova dungito estis submetita al iu ‘ŝerco” , ofte kun seksaj konotacioj, antaŭ ol esti akceptita en la rondo de la laboristaro. Ankaŭ la studentoj , almenaŭ en Francujo, devis alfronti novicelprovadon ( bizutage en la franca) kaj kvankam ĝi fariĝis kontraŭleĝa en 1998- la puno estas ses monatoj en malliberejo kaj monpuno de 7500€ - ĝi ne tute malaperis.Mi esperu ke la nuna tendenco trovi distraĵojn en la virtuala mondo forigos la emon reale turmenti aliajn homojn. *Franciska Toubale*



Ekkonu ke parto de viaj impostoj pagas por la armiloj kiujn nia Ĉefministro sendas por mortigi homojn en Ukrainujon kaj minaci ĉinajn militflugmaŝinojn apud/en ĉinujo. *Roger Springer*

# PRI FUMADO



Malgraŭ la kresko de la monda populacio malpli da homoj fumas: en 2018 ankoraŭ 1,32 miliardoj kompare kun 1,3 miliardoj en 2020. La Monda Organizo pri Sano (MOS) antaŭvidas ke pro pliaj ĝiaj reguloj en 2025 la fumantaro atingos 1,27 miliardojn, t.e. malpli ol kvinono, kompare kun triono en 2000.
El la viroj fumas ankoraŭ 36,7 procentoj, el la virinoj 7,8 procentoj. Tutmonde inter infanoj de 13 ĝis 15 vivojaroj fumas 38 milionoj.
Laŭtakse jare mortas po 8 milionoj pro tabakfumado.

### NOV-ZELANDO

Prokrastiĝis la malpermeso vendi tabakaĵojn al junuloj: origine la malpermeso koncernus infanojn naskitajn ekde 2004, nun nur en 2025 14-jaruloj kaj pli junaj laŭ la registara plano ne plu povos aĉeti fumvarojn. Krome oni draste limigos la nombron de vendolokoj de tabakaĵoj kaj devigos fabrikantojn malpliigi la nikotinan enhavan de siaj produktoj.

## S-ro Tabako

Magistriĝa studento de la Erasmo-universitato en Roterdamo kun la konvena nomo Enoch Tabak ĉiuvendrede je la tagmezo dediĉas la lunĉpaŭzon al kolektado de la okulpikaj cigaredostumpoj, senĝene forĵetitaj de studentoj sur la universitata tereno malgraŭ la fummalpermeso valida ekde augusto 2020. Ĉiufoje li rikoltas butiksakplenon da cigaredrestaĵoj. En mesaĝo li alvokas kunstudentojn helpi purigi la terenon.

### TABAKKULTIVISTOJ

Eblus transformi la 4 milionojn da hektaroj de tabakkultivejoj en agrojn kun pli utila produkto. La ĉefaj tabakkultivantaj landoj estas Ĉinujo (39,6%), Hindujo (8,3%), Brazilo (7%) kaj Usono (4,6%), entute 120 landoj ĝis nun preferas tabakkultivadon.
En Hindujo oni eksperimentas per alternativaj produktoj.
Precipe en Afriko BAT (*British American Tobacco*) kontraŭas la alternativan kultivadon, “ĉar tabakkultivado pli bonstatigas la agrikulturistojn”. Ŝanĝon malhelpas manko de infrastrukturo.
En Europo tabakon liveras ĉefe Italujo, Pollando, Grekujo, Kroatujo, Francujo, Hungarujo kaj Bulgarujo el entute 66 000 hektaroj. Nur en 2018 EU malpliigis la subvencion al tabakkultivistoj. Male la ministrejo de Italio ĵus novigis la kontrakton kun PMI (*Philip Morris International*).
Prefere la landoj subvenciu aliajn produktojn nutrajn aŭ bio-energiajn.



Artikolo venas el PURAJ PULMOJ, organo de Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj (TADEN). La 31-a de majo estis la monda Nefumtago. Sendis al AE *Katja Steele*

La sukceso de milito dependas de kiuj mortigis la plej multajn homojn. Mi kredas ke soldatoj estas homoj ne peonoj. Detruitaj militaj aviadiloj ktp ankaŭ enhavas homojn Mi scias ke la plej multaj soldatiĝis pro la salajro, ne por militi. Devigitaj soldatoj estas peonoj. Bedaŭrinde multaj homoj kiuj estas la herooj dum milito estas tiuj, kiuj ŝatas la eblecon ĉasi kaj mortigi homojn.

*Roger Springer*




## Esperantisto ŝatas Pacon



Ĵus edziĝis sepdekjara milionulo al 20-jara virino.

"Vi maljuna ruzulo" diris unu el liaj amikoj. "Kiel vi sukcesis akiri tiom belegan junan edzinon?"

"Tre facile" respondis la milionulo. "Mi diris al ŝi, ke mi estas 95-jara"!



**3ZZZ**... La elsendo de la 6a de junio 2022 temas pri konstato rilate diskriminacion al maldekstraj manuloj , iom da historio ( kontraŭvolaj steriligoj , situacio en Malto dum la dua mondmilito ) kaj por la kuraĝuloj propono ŝanĝi sian dieton.



*Franciska Toubale*